



PENSEO

N-ro 171

Jan./2006

Monata Beletro Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 17-a jaro <http://www.elerno.net/penseo/penlisto.htm>

RIMPORTRETO

pri Cicio Mar(1914-1999)

Hu Guozhu

Cicio Mar --- plumo talenta
debutis jam ekde junaĝo.
Andersen-fabelojn kun saĝo
tradukis li per kompetenta

poligloteco eminenta.
Rakontis pri Monta Vilaĝo.
Cicio Mar --- plumo talenta
rekordis jam ekde junaĝo.

Viv' de forgesitoj legenda,
eseoj pri l' monda vojaĝo
allogas nin ĉiam per plaĉo
sam-kiel Montaro Silenta.

Cicio Mar --- plumo talenta!

Du Papilioj

Pang Long

kara, vi malrapide flugu
gardu vin de dornaj rozoj
kara, vi malfermu l' buŝon
vin arom' enventa ebriigas
kara, flugu kune kun mi
por rigardi rojon trans la bosko
kara, ni du dancu dancon
ne mallumas la printempo ama
ni kunflugu amolige, flirte

ni akompanu por eterne
mi vin sekvas dum tutvivo
sen ioma pent' pri l' amo al vi
por ne vanigi mian amon k' vian belon
ni kunflugu amolige, flirte
ni akompanu por eterne
eĉ ĝis kiam falfolioj amasiĝas en aŭtuna
vento
mi ne pripentos akompanion mian kun vi



esperantigis **Emo**

Ho, Petolema Sceto

Ardo

Surstrate nia petolema infankora sceto
paŝas,
ennokte nia gekunuloj gajhumore kantis
sub stratlampe,
somere tiam ni vagantoj renkontiĝis
Yangling ja hazarde.
jam pasis tiom da beltagoj, kie vi nun
restas?



El Libro de Poezio

Reto por ĉasi leporojn

**kanto pri ĉasado de leporoj far princo kaj ties soldatoj.*

Densas retoj la leporaj,
Vi palisojn frapas tinte.
Vi, soldatoj estas gloraj
Regnon princan defendinte.
Densas retoj la leporaj
Inter vojkrucaĵoj stare.
Vi, soldatoj estas gloraj
Princanj kompanoj rempare.
Densas retoj la leporaj
Jam metataj en arbaro.
Vi, soldatoj estas gloraj
Fideluloj dum batalo.

Plantagoj

**virinoj, ĝoje kantante, kolektas plantagajn semojn.*

Ni kolektas plantagajn semojn,
Rapide kaptu ĝin de spiko.
Ni kolektas plantagajn semojn,
Rapide prenu ĝin de tigo.
Ni kolektas plantagajn semojn,
Rapide pluku ĝin de tero.
Ni kolektas plantagajn semojn,
Eĉ elŝiriĝu ĉiu ero.
Ni kolektas plantagajn semojn,
Per baskoj estu la kuntreno.
Ni kolektas plantagajn semojn,
Nun portas hejmen en robpleno.



Vasta Han-rivero

**juna hejtajhakisto amas junulinon, sed ne gajnas ŝian amon. Sopirante al ŝi, li kantas.*

Arbo en la sudo altas,
Sub la ombro mi ne haltas.
Junulino, Han-rivere,¹⁾
Mi ne gajnas ŝin despere.
Han torentas larĝe, vaste,
Trans ĝi mi ne naĝas haste.
Rivero longe flu-tiras,
Kaj ĝin mi ne ĉirkaŭiras.
Kreskas arbustoj amase,
Veprojn hakas mi emfaze.
Se vi edzigos min vole,
Nutras mi ĉevalon fole.
Han torentas larĝe, vaste,
Trans ĝi mi ne naĝas haste.
Rivero longe flu-tiras,
Kaj ĝin mi ne ĉirkaŭiras.
Absintoj dense prosperas,
Abrotanojn mi preferas.
Se vi edzigos min vole,
Prenos vin per ĉar' mi kore.
Han torentas larĝe, vaste,
Trans ĝi mi ne naĝas haste.
Rivero longe flu-tiras,
Kaj ĝin mi ne ĉirkaŭiras.
1) Han – nomo de rivero en la nuna prov.
Hubei.

tradukis **Sceto**

Kiu estas mia propra patrino?

*Senegoisma amo, la plej sincera kaj emocia,
neniam perdigus Grace-n..*

Kiam mi ordigis la litĉambron, lumo de la matena suno oblikve filtriĝis. Zumante arion, mi ĝoje faris purigadon Ĉe tiu momento mi sentis, ke iu staras malantaŭ mia dorso.

Ŝi estis Lisa, nia 15-jara filino. Ŝi surhavis iom strangan mienon. “Kia surpriziĝo, Lisa,” mi demandis, “kian aferon vi havas?”

“Kiu finfine mi estas?” ŝi demandis.

Malvarmo kuris tra mia spino. “He! Vi estas Lisa Thompson, ĉu ne?” mi respondis, altrudante rideton.

“Ne! Mi volas demandi, KIU finfine mi estas,” maltrankvileco ludis sur ŝia vizaĝo.

Ŝin adoptis mi kaj mia edzo Rue. Kiam ŝi estis kvar-jara, ni jam diris al ŝi pri adoptado. Ekde tiam, ŝi ŝajnis kompreni nian sinceran amon al ŝi. Kelktempe mi deziris, ke ŝi montru sian ardan amon al ni. Malgraŭe ŝi ĉiam montris sin obeema kaj dolĉa.

“Kiu estas miaj gepatroj?” ŝi esploris.

“Nu, Lisa, vi scias, ke ni adoptis vin, sed mi kaj via patro estas viaj...”

“Vi ambaŭ ne estas miaj propraj gepatroj nek vi mia propra patrino! Mi volas scii, kiu ŜI estas.”

“Mi ne scias, Lisa.”

“Vi ja scias!” ŝi insistis, grincante dentojn kaj retenante larmojn. “Vi ne lasas min scii, kiu ŜI estas.” Ŝi kolerege eliris, kaj mi falis sur la liton deprimite.

La sceno antaŭ dekkvin jaroj reaperis antaŭ miaj okuloj. Kuracisto admonis min pri adoptado. Li diris, “Kelkaj adoptitoj neniam volas scii, kiuj estas iliaj propraj gepatroj, dum aliaj ĉiumaniere trovas la solvon.”

Mi vere ne volis scii, kiu ŝia propra patrino estas. Laŭ mia rememoro, iun frumetenon de sunbrila septembro, mi ĉirkaŭprenis tri-tagan nov-naskiton. Kompreneble ĝi estis naturdotitaĵo al mi. Tiam mi jam aĝis 36-jara. Ekde mia geedziĝo antaŭ 17 jaroj, mi estis preĝanta havigi al mi “Lisa-n”. Sur la leĝa dokumento skribiĝis nur la nomo de ŝia patro. Mi ne komprenis, kial ŝi peneme provas serĉi sian patrinon. Ni nur sciis, ke ŝi jam eltrovis sian naskiĝateston kaj vizitis la kuraciston, kiu akuŝigis ŝian patrinon, konsultis advokaton, faris vizitojn al la amikoj de sia familio, kaj eĉ

trovis, ke la rekordo konservita en la juĝejo pri ŝia naskiĝo ne estas malferma al la publiko, sed ŝi ne ĉesis sian penadon.

Ekde tiam ŝi maltrankviliĝis tagon post tago. Pro tio, ŝi postrestiĝis en lerneja studado kaj fariĝis retenema kaj malvarma al mi kaj Rue. Ŝi ofte konsultis psikologian kuraciston, sed vane. En la somero de ŝia dekoka jaro, ŝi falis en terure surprizigan rankoron. “Se mi ne sukcesos malkaŝi, kiu mi estas kaj al kiu mi apartenas, mi neniel trankviliĝos...” ŝi ofte diris.

Ŝiaj vortoj tranĉis mian koron. Ĉu mi estas tiel malica patrino? Se ŝi eltrovos sian propran patrinon, ĉu ŝi firme rompos la rilaton kun ni aŭ ne?

Iun sufoke varman posttagmezon, suprenirinte la etaĝon, mi trovis ŝian ĉambropordon fermita, al kio mi jam kutimiĝis. Mi fluster diris, “Hola, Lisa! Kial vi fermas vin ene tiamaniere? Vi scias, ke ni amas vin. Ni nur esperas, ke vi fartu bone.”

Mi retropaŝis kaj tenis la balustradon malantaŭ mi. “Ni esperas, ke vi fartu bone,” mi ĵus diris. Lisa volas sciiĝi pri siaj propraj gepatroj, kio estas bona afero. Mi jam enmetas ŝin en la ĉirkaŭprenon de mia egoisma amo. Se mi havas plenan konfidon pri Lisa kaj mi mem, ĉu mi devas neniigi tian ĉirkaŭprenon? Ĉe la supro de la ŝtuparo, en morta silento, ideo kaptis min — ĉu mi jam amas ŝin ĝis tia grado, ke mi volontus priserĉi ŝiajn gepatrojn por ŝi? Malvarma tremo kuris tra mia korpo. Se mi eltrovos ilin, mi eble perdos ŝin. Nun mi jam klare komprenis, ke mi povas fari nenion alian ol fari tian riskon pro mia profunda amo al ŝi.

Post kelkaj semajnoj, mi kaj Rue petis helpon ĉe agentejo de privata detektivo. “Ni volas, ke vi eltrovu la proprajn gepatrojn de mia filino,” diris Rue. Post nia rehejmeveno per aŭto, ni jam sentis la venontan perdiĝon de nia filino.

